

**ELDONANTOJ:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
I. Gill Norton, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonjo)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

**REDAKTOROJ:**  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Felletona red.: Zanoni.

**ADMINISTREJO:**  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtekkonto Köln 70865,  
por Teo Jung, Horrem.

**ANONCOJ**  
el ĉiuj landoj 5 germ. mk.,  
po cm², ĉe grandaj aŭ  
ripetataj anoncoj rabato.

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

### Internacia SEMAJNA Neŭtrala

Intencante aliĝi al la XIV-a Kongreso en **Helsinki** aliĝu tuj! Ne prokrastu vian aliĝon ĝis la lasta momento!

**Numero 88 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 11. Junio 1922.**

# Ĝis 31. Majo 636 Kongresanoj por la Dekkvara.

Dum la presado de nia antaŭa numero atingis nin telegramo el Helsinki pri la nombro de la ĝisnunaj aliĝintoj al la XIV-a (636 kongresanoj el 41 ŝtatoj).

Komparante tiun ĉi nombron kun tiu de la aliĝintoj al la Praha kongreso, komunikita de ni en nia numero de 29. majo 1921, ĝi estas jam preskaŭ la sama (Praha 737, Helsinki 636). Sed jam en nia numero de 12. Junio 1921 ni povis raportii pri 1700 kongresanoj por Praha.

Kvankam ni ne kredas, ke la aliĝoj por Helsinki atingos la saman ciferon je la sama tempo, ni rajtas supozii, ke la plej multaj aliĝoj al la XIV-a alvenos dum junio kaj ankoraŭ dum julio.

El multaj landoj, kiuj estis reprezentataj en Praha per konsiderinda nombro da kongresanoj, ĝis nun nur malmultaj personoj aliĝis al la XIV-a. Precipe el la skandinavaĵ landoj la aliĝoj certe plimultiĝos.

Ni petas instate ĉiujn gesamideanojn intencantajn vizitii nian plej nordan kongreson, aliĝi kiel eble plej baldaŭ. Ju pli baldaŭ vi aliĝos, des pli vi faciligos la laboron de la Loka Kongresa Komitato, des pli bone la L. K. K. ankaŭ povos zorgii pri via oportuno dum la kongreso. Do ne atendu ĝis la lasta momento!

apostolojn, pretajn nur por tiu ideo vivi kaj ĉion por ĝi oferi, ĝi nepovas baldaŭ konkerii la mondon. Tial mi pardonpetante permesas al mi rememorigi, pro kio ni batalas.

Multaj niaj samideanoj ofte parolas pri graveco de internacia lingvo, sed praktikke el ĉiuj iliaj agoj vidiĝas, ke ili nur frazdiradas: en ilia propra vivo Esperanto okupas nur tre malgravan lokon — multaj el ili nek mem penas bone ekposedi la lingvon, nek instruas tiun predikatan bonajn al siaj plej proksimaj familianoj. Vidante tion, la mondo nepre devas pensi, ke Esp. predikanto hipokritas. Kaj estas klare, ke en vereco laŭ ilia kompreno Esperanto ne estas preskaŭ ĉion ŝanĝanta potenco, devanta levi la homaron sur pli altan evolustupon, — ideo, kies efektiviĝmomento estos naskiĝtago de plej mirinda kreitaĵo — de vera homarorganismo, sed nur mizera neces-okaza kompreniĝilo. Kaj mi pensas, ke ni laboras por kunfandiĝo de apartaj organismoĉeloj-naĉioj. amebaj-naĉioj en unu multe pli perfektan, pli potencan, belan kaj prudentan homarorganismon.



Helsinki. — Preĝejo de S-ta Nikolao, vidata de Oriento. Konstruita laŭ projektoj de J. L. Engel.

Nun ĉie aŭdiĝas krio pri neceso spiriritigi la vivon. Esperanto estas plej potenca ilo por dissemi la veron, por ĉarmigi la homojn per belo, por eduki homarĉelojn-naĉiojn por rateca amo kaj inspiri al la tuta homar-organismo amon kaj admiron al la plej alta estaĵo — Dio. Pro ĉiam ankoraŭ ne finiĝanta fratmurdado ĉiam pli laŭte aŭdiĝas dolorkrioj pri neceso paciigi homaron — kaj nur ni Esperantistoj havas en niaj manoj certan tion fari el la homaro veran familion.

La fundamentoj de la tuta mondo estas nun sekurigitaj per la postulo socialigi la vivon. Kiu ne vidas, ke sen Esperanto tio ne estas ebla?

Kaj kien ajn ni direktos nian rigardon, ni vidas, ke la homaro alpaŝis nun tiun limon, ĉe kies transpaŝo estas necesa la scio de internacia lingvo.

Do mi pensas, ke Esperanto estas tiam granda ideo kaj rekta neceso, ke valoras, ke ni ankoraŭ nemultaj batalantoj por ĝi deturnu nin de l' servo al aliaj pli malgrandaj ideoj kaj tutan nian vivon, ĉiujn niajn fortojn, ĉiun diritan kaj skribitan vorton dediĉu nur al Esperanto.

Plugistoj de aliaj kampoj estas multaj — ni ne peku forlasante la de l' sort' al ni konfiditan plej noblan laborkampon. Precipe vi, Esperantistoj de malgrandaj popoloj, kiuj estas tiom tentataj fermiĝi en via malgranda ĉelo kaj kunhelpi la konstruadon de hinaĵ muroj inter popoloj, ekmemoru nian altan mision, ŝtopu viajn orelojn je malicaj kantoj de naĉiismo kaj iru rekte kaj cel-

konscie al la konstruado de tuthomara kulturo, literaturo, kies lumradioj heligos la vojon kaj dolĉigos la vivon ankaŭ al viaj samlandanoj, samnaĉianoj. Ĉesu senfrukte transversadi akvon el unu ujo en alian — Ĉesu peregi tiam da necesa por ni, por vera konstrulaboro forto per senbezona tradukado de libroj en naĉiajn lingvojn. Ĉio komunehoma jam de hodiaŭ devas esti esprimata en Esperanto kaj nur naĉiaj apartaĵoj en naĉiaj lingvoj.

Karaj samideanoj! Se ni volas atingi nian belan celon, komencu ni fine efektiviĝadi tion, kion ni predikas.

**Malgrandnaĉiino.**

### Akademio.

**Akademia Fakoj pri Konkursoj kaj Premioj.**

Dum la vintro 1921—22 la Akademio ne sin okupis pri premiado, ĉar ĝi ricevis nur unu verkon por ekzameno kaj eventuala rekompenco. La kaŭzo estas sendube, ke nek aŭtoroj, nek eldonistoj sufiĉe informiĝis pri la Regularo. Utile estas do ĝin denove publikigi kaj kongiti al la Esperantista publiko. — Por eviti senutilan elspezon al aŭtoroj kaj eldonistoj, la rekompenco estas nur honora, — la sendado de la libroj estu farata jenamaniere: Kun la prezento oni sendu:

- 1 ekzempleron al la Prezidanto de la Akademio: Prof. Th. Cart, 12 rue Soufflot, Paris.
  - 1 ekzempleron al la Direktoro por Konkursoj kaj Premioj: D-ro E. Privat, 2 Chemin de Roches, Genève.
- D-ro Edmond Privat.
- Regularo pri verkoj rekompencotaj de la Akademio.**
1. La Akademio rekompencas ĉiujare kelkajn verkojn rimarkindajn laŭ stila rilato.
  2. La nombro de la kronitaj verkoj ne superos kvin (5).
  3. Oni rajtas proponi por la rekompenco tradukojn, sed originalaĵoj estos preferataj de la Akademio.
  4. La prezentataj verkoj devas esti publikigitaj en la lasta jardeko.

### Ni agu laŭ niaj konvinkoj!

Rim. de Red.: Kvankam ne konsentante kun ĉiuj detaloj de la artikolo, ni opinias ĝin atentinda por diversa interesaj pensoj esprimitaj en ĝi.

Konsiderante la dum 33-jara propagandado atingitajn rezultatojn, ni devas konsenti, ke ili estis grandaj: sed certe ĉiu ankaŭ konsentos, ke ili povus esti multe pli grandaj, se ni konsekvence agus laŭ niaj konvinkoj: laŭ tio, kion ni predikas. Bedaŭrinde multaj el niaj samideanoj ŝajne ne tre bone komprenas, pro kio ili batalas; aŭ se eĉ komprenas, tamen tiu celkompreno ne trapenetris tutan ilian personecon, ne fariĝis ilia vivgvidanta ideo. Kaj se tiu ideo ne havas tiamlime sindonajn

Esperanto devas esti la spiro de tiumonda homara organismo, kaj la naĉiaj lingvoj restos nur spirorganoj de apartaj organismoĉeloj-naĉioj. Kaj ju pli alta estas la vivo de tuta organismo, des pli alta devas esti la signifo de Esperanto kompare je tiu de naĉiaj lingvoj.

Komprenante tiel Esperanton, mi vidas en ĝi entenataj ĉiujn grandajn ideojn de l' nuntempo.

kaj famulo. Eminentulo! Ho, si tacuisses, ho, ke mi povu repreni la nepripensitan vorton. For estas deposit tiu tago mia paco; mia edzino mem nun instigis min, fari kaj forsendi la tradukaĵojn. Ŝi preskaŭ ne plu povis atendi laleteriston alportontan la gazeton kun mia presita nomo. Bedaŭrinde mi neniam havis sukceson. "Ree alia ricevis la premion, vi malsagulo!" ŝi ekkriis kolere kaj jetis la gazeton al mia kapo. Sekrete mi skribis leteron al la recenzisto kaj petegis lin, sendi al mi la premion kaj enpresii mian nomon en la gazeto; volontege mi estus preta ĉion pagi, li ja povus korekti kaj anstataŭigi mian nomon en sekvonta numero; sed li rifuzis. Mia edzino iĝis pli kaj pli malbonhumora. Fine ŝi petis min, ne, ŝi ordonis, instrui al ŝi Esperanton. Ju pli mi malkonsilits, des pli energie ŝi insistis. Kaj kion ne farus bonedukita edzviro por amata edzino? Mi konsentis, kaj la lernado komenciĝis. Kaj tre fervore ŝi lernis; ŝi forgesis ĉion ĉirkaŭ si: min, la infanojn, siajn romanojn; ŝi eĉ rezignis je la kutima prinovaja konferenco kun la najbarinoj. Mi devis fari la ĉiutagajn masurumajn aĉetojn, dum ŝi lernis Esperanto-vortojn, mi devis petigi la tagmanĝon, dum ŝi tradukis ekzercaĵojn, mi devis gardi la infanojn kaj endormulii la plej junan, dum ŝi deklamis lingvajn regulojn, mi balais la ĉambrojn kaj baipurigis la tapiŝojn laŭ la taktiko de la Esperantista Himno, kiun ŝi kantis kaj ludis sur forteplano. Senbezono ŝi ironie laŭdis min pro miaj virinecaj kapabloj. Foje kaj refoje ŝi konsultis min pri la signifo de iu vorto aŭ teksto. Eĉ dumnokte mi ne plu povis trankvile dormi. Sed la supron atingis ŝia Esperantemo en nokto, kiun neniam mi forgesos.

Mi jus havis agrablan sonĝon, kiam mia Eŭlalio per kelkaj sufiĉe maldelikataj enripaj puŝoj ekvekis min.

"Kiel vi povas dormi, dum via edzino sendorme pritraktas en sia kapo la plej gravajn problemojn?" Imagu, sinjoro, problemojn ŝi pripensis, gravajn problemojn!

"Ne ĝenu min per viaj gravaj problemoj, kiuj certe estas nur bagateloj aŭ stultajtoj!" mi kolere . . . pensis. "Kio do ĉagrenas vin, mia karulino?" mi karese demandis. "Vi ja scias, ke vi havas per mi komprenplenan helpon en ĉiuj aferoj de la vivo."

"Nu, vi certe scias parkere la Himnon Esperantistan. Bonvolu diri al mi la daŭrigon en la dua strofo post la vortoj: 'forte staras', mi tute forgesis ĝin."

"Ĉu tio estas ĉio?" mi nun efektive malbonhumore rediris. "Pro tiaj vantaĵoj vi ĝenas mian noktan pacon? Mi dormas."

"Vantaĵoj? Ĉu tiel malmulte da kompreno vi havas por la sankta afero? Sed mi konas vin", — kaj jam ŝia voĉo plilaŭtiĝis — "vi nur volas kaŝi vian nescion, vi malsagulo."

Cu mi akceptu ĉi tiun riproĉon aŭ ĉu mi risku noktan disputon kun malpacema virino?

"Trankviliĝu, mi ja volonte plenumos vian deziron. Jen la daŭrigo: Forte staras? . . . forte staras . . . staras . . ." Ho, kio nun? Ĉu arbardoj?? montoj?? ĉeloj?? Foje kaj refoje mi rekomencis deklami, la unuan strofon, la duan, sed ĉe la vortoj 'forte staras' min forlasis la memoro, ankaŭ mi ne trovis la daŭrigon.

"Ĉu mi ne diris", ŝi mokis, "ke vi ne scias la Himnon? Vere, mirindan helpon mi havas per vi en ĉiuj aferoj de la vivo! Ne mirige, ke vi neniam gajnas la premion; sed, se oni premias la malsagecon, vi certe havus la unuan."

Nun mi koleris pri mi mem. Hontinde estus, ne scii parkere la Himnon! Ha, eble mi sukcesus, se mi kantus la Himnon! Tuj mi ekaldigis en

mia lito, faris geston por silentigi mian edzinon kaj kantis la meznokta horo la amatan himnon, la unuan strofon, la duan; jen venis la vortoj: "forte staras". Kaj eĉ ne unu momenton mi haltis, tute flue eligis la vortoj el mia buŝo: "forte staras muroj de miljaroj inter la popoloj dividitaj". Ĉu estas mia kulpo, ke mi havas belsonan kantorganon, ke la entuziasmo pli kaj pli kaptis min? Kun ĉiu vorto pligrandigis mia fervoro, pli kaj pli laŭte eventis la melodio el mia busto. Terurite la infanoj ekleviĝis en siaj kuŝejoj kaj komencis ploregi, vane mia edzino penis fermi mian buŝon por la kovrilo — mi forbatis ŝian manon kaj daŭrigis la kantadon, kaj jen kun la plej alta entuziasmo kaj pulmforto la finaj vortoj: "por eterna ben' efek . . . ."

Bum — bum, bum — bum, bum — bum — ĉu la domo disfalis? — Bum — bum — bum — bum — bum; oni frapis, oni frapegis sub ni. La terura "bumbado" senentuziasmigis min kaj malfanfarone mi diris:

"Ŝajnas, ke miaj subaj kunloĝantoj frapis kontraŭ la plafono!"

Kara sinjoro! Ĉu vi konas la virinojn? Ĉu vi supozas, kion respondis mia edzino? Ĉu vi opinias, ke ŝi penis trankviliĝi min, la infanojn, la frapintojn? Tute ne!

"Ĉu kontraŭ la plafono ili frapis," ŝi ekkriis, "ĉu kontraŭ la plafonooonoo?"

Mirigite pro ĉi tiu aliĝo de la afero mi rediris: "Komprenble, kontraŭ la plafonooonoo."

"Ho! vi simplulo, vi malklerulo, vi stultulo," — kaj ŝia voĉo plilaŭtiĝis — "Kontraŭ la planko ili frapis, kontraŭ la planko!"

Pro tiu ĉi malspritajo mi nun ankaŭ iĝis furioza kaj kriis: "Ne, ne, kontraŭ la plafono. Ili ja certe havas super si la plafonon, kaj la planko troviĝas sub ili, do . . ."

### Se virinoj lernas Esperanton, aŭ: La nokta Esperanto-batalo.

Kara s-o redaktoro!

Estas vera malsanco: mia edzino nepre volas lerni nian karan lingvon Esperanto. Ĉu vi opinias, ke ĉi tio entute estas afero por inoj? Se tion entreprenas eble ravaĵ knabinoj kaj ĉarmaj junulinoj, revemaj fraŭlinoj aŭ ĝenilaj flancinoj, senokupaj sinjorinoj kaj lacaj praavinoj, lernemaj studentinoj aŭ sekanimaj profesorinoj, se tion faras oficistinoj, librotentistinoj, telefonistinoj, vendistinoj, komercistinoj, redaktoroj kaj aliaj, mi tute ne malkonsentas, sed nepre mi dubas, ĉu tio taŭgas por plenkreskaj virinoj, bonedukitaj edzinoj kaj zorgemaj patrinoj. Komprenu min ĝuste, sinjoro, mi certe ne asertas, ke Esperanto ne taŭgas por ĉi tiuj personoj, ne, mi nur pridubas la taŭgecon de ĉi tiuj personoj por nia lingvo. Cetere mi opinias, ke oni ne tro multe saĝigu la inojn; ju pli klerigitaj ili estas, des pli ili kredas sin egalrajta kun ni viroj aŭ eĉ superaj je ni, kaj kompreneble poste ili ĉion scias pli bone ol ni mem. Denature ili ja havas la emon, enmiksi sin en aferojn, kiuj tute ne koncernas ilin.

Kiel nova, sed progresema Esperantisto mi estas abonanto de progresiga Esperanto-gazeto; ĝi ofte enhavas tradukajn taskojn, kiujn mi ĉiufoje solvas kaj sendas al la redakcio. En la komenco mia Eŭlalio — ĉi tio estas la ĉarma nomo de mia kara edzino — min riproĉis pro la malŝparo de papero kaj tempo kaj por la senutilaj sendelspezoj. Sed mi klarigis al ŝi, ke mi ja havas la eblon gajni premion por la plej bona traduko, ke tiaokaze mia nomo estos presata en la gazeto kaj ke tiamaniere mi eble fariĝos eĉ eminentulo

5. Nur libroj, kia ajn estas illa amplekso aparte eldonitaj, sekve ne gazetaj artikoloj, nek manuskriptoj, estas prezentablaj.

6. Verkoj de Akademianoj ne estas rekom- penceblaj.

7. La rajto de prezentado estas rezervita al la membro de la L. K., kiuj rajtas proponi ĉiu po du verkoj, kun konsento de la aŭtoroj.

8. La proponoj, montrante tre klare kaj precize la titolon de la verko, la eldonejon kaj la daton de la unua apero, devas esti sendataj al la C. Oficejo (51 rue de Cligny, Paris) antaŭ la 1. de Marto . . . . .

9. Akademia komisió elektos, post la legado de ĉiuj proponitaj verkoj, la dek plej bonajn.

10. La plena Akademio post raporto de la komisió, elektos la 5 rekomencotajn.

## Skoltismo kaj tutmonda gejunularo.

La plej ĉagreniga aspekto de la lastatempa granda milito estas la terure vasta detruo de junulaj vivoj. La maljunuloj de la militantaj nacioj ilin sendis en la buĉejon de la batailkampoj, por ke ili estu senlore mortigataj unu de alia. La rezulto de tiu vasta detruo de junulaj vivoj estas evidenta hodiaŭ, kiam la tuta mondo ankoraŭ estas en ĥaosa stato.

La junularo de la mondo ne volis batali unu kontraŭ la alia. Tute ne. Ili estas kontentaj per labori la vivrimedojn kaj vivi en frata harmonio inter si. Ili pensoj estas tro puraj kaj plenaj de la ĝojo de la vivo por voli detruo la vivon: tamen, bedaŭrinde, ili blinde, ŝafe, respondis la alvokon de la maljunuloj kaj iris batailkampen. Kaj rezulte — ho ve! estas koropremege pensi pri la rezulto. Ĉirkaŭ ni hodiaŭ la postsignoj de la granda milito akriĝas nian senton, ke maljustega estas la militado, ke ĉiam la militado estas absolute malhonora, malantaŭenema, postsigno de barbaraj tempoj.

Sed la junularo ne ĉiam estos kontenta esti buĉata en militoj organizitaj de la gemaljunularo. Ĝi trovos pli saĝajn rimedojn por solvi internaciajn malkonsentojn, disputojn kaj problemojn. Ne plu ĝi lasos al la maljunularo solvaĉi tian aferojn, ne plu ĝi konsentos esti buĉata kaj kripligata laŭ ordonoj de la maljunuloj — nova, forta sento eniras en la korojn de la junularo: la sento de tutmonda frateco, la sento, kiun plene komprenas la serioza Esperantistaro.

Tamen, por ke tiu nova sento regu, estas necese, ke la gejunularo estu organizata kaj edukata eĉ nun.

La skolta movado, kies ĉefa celo estas internacia frateco kaj interkompreno, kaptis kaj kaptadas la korojn de la gejunularo de la mondo. Post ĝia naskiĝo en Anglujo antaŭ ĉirkaŭ dek-kvin jaroj, ĝi kreskis eĉ pli rapide kaj pli sukcese ol la Esperanta movado, kiu naskiĝis jarojn antaŭe.

La skolta organizacio kaj eduka sistemo estas bazita sur la Skolta Promeso kaj Leĝaro. Ĉiu knabo, antaŭ ol fariĝi skolto, promesas 1. esti lojala al Dio kaj la Reĝo (t. e. sia lando), 2. ĉiam helpi al aliaj homoj, 3. obedi la Skoltan Leĝaron. La kvara leĝo postulas, ke skolto estu frato al ĉiu alia skolto, ne gravas al kiu socia grado la alia apartenas.

Tiu, kiu konas knaboskoltojn, scias, ke ili estas plej frataj, bonfarantaj, bonhumoraj, toleremaj. La skoltoj malamas la militadon: ili lernas flegi la vunditojn kaj malsanulojn, savi drantonajn, kaj esti pretaj ĉiokaze helpi al la homaro, eĉ se ili devas riski la vivon mem por plenumi tiun devon.

Konsiderante la bonegajn celojn kaj laboron de la skolta movado en ĉiuj civilizitaj landoj, ĉu oni povas kredi, ke — kiam tial ĉiuj ĝeunuloj plenkreskiĝos — ili volos militi unu kontraŭ la alia? Certe ne! Anstataŭe, kiam ili estos plenkreskintaj, la „ĉiela regno“ jam estos veninta! Vera, ĉiamdaŭra paco regos super la mondo. Konsiderante la bonan influon de la skoltaj idealoj, ĉu la Esperantistaro ne devus interesi sin pri la knaboskoltoj por instrui ilin pri Esperanto, la lingvo de tutmonda frateco? Certe jes! Tiuj ĝeunuloj, kiuj estas geknaboskoltoj, havas en siaj koroj la fundamentajn kvalitojn de Esperantismo. Tial ili devus esti varbataj en la vicojn de la Esperantistaro.

La Skolta Esperantista Ligo prenis sur sin la noblan taskon organizi la Esperantisto-ĝeunulojn de la mondo. Ĉu la Esperantistaro helpas al tiu Ligo? Certe jes!

La subskribanto volas ricevi proponojn de ĉiuj, kiuj povas helpi al la Ligo eĉ iomete. Spertaj Esperantistoj povas instrui klasojn de ĝeunuloj. Ili povas preparoli nian Ligon kaj ĝitajn celojn inter siaj amikoj. Multon ili povas fari, se ili volas. Kiu helpos?

Sen la ĝeunularo Esperanto neniam venkos. Ne perdu la okazon. Nia Ligo kreskas ĉiutage; tamen ni ne estas kontentaj, ĝis la tuta geknaboskoltaro de la mondo estos aliĝinta al nia Ligo (tiam la skoltaj estroj alprenos Esperanton?). Skoltoj troviĝas en preskaŭ ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de la civilizita mondo; tial la Esperantistaro ne bezonas serĉi tre malproksime por novaj junaj varbotoj. Vekigu, Esperantistoj! Skribu tuj al mi, kaj ni kune laboru por la bono de Esperantismo kaj Skoltismo!

J. W. Leslie,

Propaganda Faktestro de S. E. L.,  
527, Lea Bridge Road, Leyton, London, E. 10. Angl.

## XIV-a Universala Kongreso de Esperanto

### VIII-a Kongreso de Universala Esp. Asocio

en Helsinki-Helsingfors, Finnlando  
8.—16. aŭgusto 1922.

Natŭa Komuniko.

1. Oficialan informon pri la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto sendis la Finnlanda ministerio por eksterlandaj aferoj per la Finnlandaj legacioj al la eksterlandaj registaroj por diskonigo al la interesatoj.

2. Alveturo al Finnlando.

Ŝanĝigitaj prezoj:

Svedujo. El Stockholm al Helsinki. I. kl. 68.— sv. kr., II. kl. 56.— sv. kr., III. kl. 44.— sv. kr. Ĉio sen manĝo. El Stockholm al Turku-Åbo. I. kl. 64.— sv. kr., II. kl. 48.— sv. kr., III. kl. (sen kajuto) 36.— sv. kr. Ĉiuj prezoj sen manĝo. Al Stockholm el Helsinki. I. kl. 264.— fmk., II. kl.

## La lasta ĝojo.

Malsanuleja epizodo de D-ro Joh. Ev. Schweiker.

Noktomezo! Akra sonorado de la telefono vekas subite la deĵorantan kuraciston el la dormo.

La doktoro levas sin sur la kuŝsofo kaj iras al la telefono. „Sinjoro doktoro, bonvolu tuj viziti la malsanulon en la ĉambro 18, lito 7“, li aŭdis raportojn per la telefono.

La kuracisto rapidas senbrue tra longa, lunkhela koridoro kaj poste sur ŝtuparo supren. Antaŭ la ĉambro n-o 18 atendas lin la flegistino. „La malsanulo havas aligradan febron kaj konstante parolas delire“, ŝi diras. La kuracisto eniras la vastan ĉambron, kiu estas preskaŭ plena de pacientoj. La rigardo de ĉiuj malsanuloj estas direktita al li. Li turnas sin al la lito n-o 7 kaj komencas observi la pacieron. Tiu ĉi fikse rigardas la doktoron. Poste li etendas sian manon al li kaj ekkrias ĝoje: „Ha, vi ĉestas, Petro! Bone, bone, ke vi vizitas mian malsanan patron! Mi jam pensis, ke vi tute forgesis min, de kiam vi fariĝis riĉulo. Tiom longe vi nenion sceligis pri mi... sed ĉio estas pardonita, Petro, mia kara Petro, ĉio!“ Li prenas la manon de l' kuracisto kaj laŭgite fermas la okulojn.

Post iom da tempo li denove malfermas la okulojn. „Ankaŭ vi ĉestas, filino!... Jes, jes, mi estis ĉiam bonvola al vi, kvankam vi... kaŭzis al mi tiom... da ĉagreno. Sed tio estas pasinta. Lenjo, se vi scius, kiom mi... amas vin!“ Li provas preni la manon de la flegistino; sed jam ne kapablas. —

Kiel feliĉege li nun ridetas!

„Gefiloj“, li daŭrigas post pli longa paŭzo sian paroladon, „kiam mi estos mortinta, tiam vi ne metu multekostan florkronon sur mian tombon, sed nur simplan... tute...“

216 fmk., III. kl. (sen kajuto) 132 fmk., ĉiuj sen manĝo. Åbo—Stockholm neŝanĝitaj.

3. Novaj vojoj:

Latvio. El Riga al Helsinki ekveturos la ŝipo „Mailand“ sabaton, la 5. VIII., je 5 h. posttagm. kaj reen ĉiumerkrede je 2 h. nokte. Lokoj I., II., III. kl. po 20. Prezoj: I. kl. 400.— fmk., II. kl. 340.— fmk., III. kl. 220 fmk. (lasta sen manĝo).

Estonio. Tallinnaj samideanoj luis specialan ŝipon „Kungla“, kiu alportos la kongresanojn el Tallinn (Reval) al Helsinki kaj reen. Prezoj: iro kaj reveno por la anoj de Esp. societoj de Estonio 900.— est. mk., por la eksterlandanoj 150.— fmk. (35.— fr. fk.); nur iro Tallinn—Helsinki aŭ nur reveno 800 est. mk. (20 fr. fk.). Kongresanoj, kiuj volas uzi la Tallinnan linion, estas petataj pagi almenaŭ duonon de la biletprezto tuj ĉe la mendo de la loko. Sin turnu al „Espero“, Tallinn, Postkast 6.

4. Praktikaj rimarkigoj:

Kontinento. Germanojn kaj aliajn kongresanojn de kontinento, kiuj intencas revojaĝi tuj post la kongreso, ni konsilas elekti la Lübeckan vojon, ĉar estas necese koncentrigi la fortojn. Ju pli da kongresanoj partoprenos en la karavano, des pli malkara fariĝos la vojaĝprezo. Sin turnu al karavangvidanto s-o Heinrich Selmer, Lübeck, Falkenwiese 11.

Al kongresanoj, kiuj volas resti en Finnlando post la kongreso por partopreni la ekskursojn, ni rekomendas la Stettinan linion.

Britlando. Gvidanto de britoj estas nun s-o H. Moy Thomas, adr. 142 a, Camberwell Grove S. E. S. London. Ĉiuj kongresanoj de la brita imperio, ankaŭ tiuj, kiuj ne volas uzi la rektan marvojon, bonvole sin turnu al s-o Thomas, ĉar li sole zorgas pri ĉiuj vojaĝaj aferoj. Li kolektas la mendojn de ŝiplokoj kaj gvidas la britan karavanon tra Germanio.

(Finota.)

## 9-a Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj

okazos en Sofio la 6.—8. aŭgusto 1922.

Samideanoj el najbaraj landoj, kiuj ne havas eblecon viziti la Internacian Kongreson en Helsinki, estas kore invitataj ĉeesti la jaran kunvenon de la bulgara Esperantistaro. Ni, Esperantistoj el balkanaj landoj, klopodu forigi la regantan inter la balkanlandanoj malamono, ni klopodu starigi fratajn rilatojn inter niaj popoloj. Tion ni atingos nur kunvenigante, konante unuj la aliajn — ni donu ekzemplon al la mondo, ke balkanlandanoj povas frate vivi.

Do, la gravan kaŭzon konsiderante, rapidu al Sofio; ni jetu la ĝermon de frateco inter balkanaj popoloj.

Tuj sciigu pri via alveno al: Bulgara Esperantista Societo, Sofia, Sekcio, bul. Maria Luiza 46, Sofia, por ke la Sofiaj samideanoj povu prizorgi pri via loĝejo kaj pri via veturo. Oni ricevos rabaton por la veturado per bulgaraj fervojoj, nur se oni ĝustatempe sciigos pri sia partopreno. Sin turnante al la Sofia Sekcio oni ne forgesu aldoni respondkuponon.

Se estas dezirantoj, oni aranĝos ekekursojn ĝis la Rila Monĥejo situata en la belega Rila Montaro (Bulgariaj Alpoj, kiel oni ĝin nomas) kaj ĝis la montosupro Nigra Pinto (2350 m.), la plej alta pinto de Vitoŝa Planina, je kies deklivoj estas situata la kongresurbo — ĉefurbo de nia lando.

## Foiroj.

La Leipzig-a Printempa Foiro 1922.

La Leipzig-a Printempa Foiro okazinta dum marto 1922 inter ĉiuj foiroj, kiuj ĝis nun okazis en kaj ekster Germanujo, okupas apartan rangon.

Li fermis la okulojn, lia konscio malaperis. — Post du tagoj oni enterigis lin. Nur malmultaj personoj akompanis lin al la lasta ripozejo. Liaj filo kaj filino ne estis inter ili. —

## Kial?

De Frans De Cort.

Kial la okuloj miaj  
servas nur por vidi vin —  
kaj rigardi emocio  
vian ĉarmon, belulin'?

Kial servas lango mia  
sole por certigi vin  
ĉiam fajre, ke vi estas  
mia sola amatin'?

Kial servas lipoj miaj  
nur por ĉiam kun kortuŝ'  
premi kisojn feliĉegajn  
al rozruĝa via buŝ'?


Vin rigardi, embrakigi,  
diri, ke mi amas vin —  
tuta vivocelo mia  
estas tio, amatin'!

El flandra lingvo Esperantigis  
Jan van Schoor, Antverpeno.

## Amerika Humoro.

„Oni diris al mi, ke vi kaj la edzino disputis hieraŭ vespere!“

„Ho jes! Sed mi ne havis ŝancon paroli eĉ unu vorton.“



Preĝejo super Helsinki. (Arkitekto Lars Sonck.)

ĉar neniam ĝis nun iu ajn foiro montris similan multnombrian partoprenon aŭ simile grandan aĉeton kaj vendon de komercaĵoj. 155 000 komercistoj vizitis la Foiro, kiuj nature ĉefe apartenis al la germanaj industriistaro kaj komercistaro, sed grandparte ili ankaŭ estis eksterlandanoj. Ĉirkaŭ 32 000 foiruloj venis el negermanaj ŝtatoj: el Egiptujo 50, Afriko 10, Ameriko 1210, Azio 210 (el Ĉinujo 40, Japanujo 90, Hindujo 10, Perujo 20 vizitintoj) Aŭstralio 10, Belgujo 1110, Bulgarujo 290, Danujo 1280, Danzig 80, Anglujo 2320, Estonujo 100, Finnlando 220, Francujo 860, Georgujo 10, Grekujo 170, Holando 5060, Italujo 1280, Jugoslavujo 400, Letonujo 360, Litovujo 70, Luksemburgo 100, Memeldistrikto 10, Norvegujo 530, Aŭstrujo 3060, Polujo 820, Portugalujo 60, Rumanujo 540, Rusujo 350, Svedujo 1550, Svisujo 1880, Hispanujo 610, Ĉeĥoslovakujo 5790, Turkujo 170, Ukraina lando 120, Hungarujo 990, Armenujo 30, krome ĉirkaŭ 100 personoj el aliaj nacioj.

Tia vizitintaro denove evidentigas la internacian karakteron de la plej granda foiro de l' mondo kaj pruvas denove, ke la malnova Leipzig-a Foiro estas kaj restas la granda internacia merkato, grave ne nur por la germana aŭ mez-eŭropa vizitintaro, sed por la tuta mondo. La Internacieco de la Foiro montriĝis ne nur per la aĉetintaro, sed ankaŭ per la ekspozitintaro; ĉar inter la 700 eksterlandaj ekspozitintoj, kiuj estas enkalkulataj en la nombro de la 12.800 ekspozitintoj, ĉiujare estis reprezentataj ne nur la eŭropaj ŝtatoj, sed ankaŭ transmaraj landoj produktantaj krudajn materialojn, ekz. la Sudafrika Unuiĝo; tio estas atentinda progreso sur la vojo al ĉion-ampleksa mondfiuro.

Al la grandega nombro de l' vizitintoj korespondis la komercado, kiun partoprenis la en- kaj eksterlandaj vizitintoj kun same forta aĉetemo. La eksterlandaj foiruloj profitis per la malalta valuto, la enlandaj foiruloj aĉetis tre aŭde, pro la minacanta plialtiĝo de l' prezoj. Oni havis la konvinkon, ke oni nenie povas aĉeti tiom sufiĉe kiel en la Leipzig-a Foiro. Pro la grandega aĉetemo la disponebla materialo de la plej multaj branĉoj estis elĉerpita jam dum la unuaj tagoj, kaj ankaŭ la novaj produktotoj de la sekvantaj monatoj, eĉ ĝis la fino de l' jaro, estas elĉerpitaj. Tio, kion oni oferis dum la Leipzig-a Foiro —

„Jes,“ diris maljuna viro al la vizitanto; „mi fieras pri miaj filinoj, kaj mi deziras edziniĝi ilin kun tre bonaj edzoj.“

La plej juna, Mario, havas 26 jarojn kaj estas tre bona knabino; mi donos doton al ŝi de mil dolaroj. Al la 30-jara Bettio mi donos tri mil dolarojn, kaj la viro, kiu estos la edzo de la kvardekjara Elizabeto, ricevos kvin mil dolarojn.“ La junulo pripensis kaj ekdemandis post momento: „Ĉu vi ne havas kvindekjaran filinon?“

„Patro, ĉu vi povas skribi mian nomon kun fermitaj okuloj?“

„Certe.“

„Bone, fermu do la okulojn kaj subskribu mian lernejan ateston!“

„Mi dezirus scii, ĉu estas vere, ke la bonaj Amerikanoj, kiam ili mortas, iras Parizon?“

„Oni ne povas certigi tion; sed mi optatas, ke la malbonaj Parizanoj, kiam ili mortas, iras Amerikon.“

„Mi timas, ke vi ne estas kapabla okupi la oficon; vi ja scias nenion pri miaj aferoj.“

„Ho jes, sinjoro; mi ja flandiĝis je via steno-grafistino.“

„Vi rompis ombrelon sur la kapo de via edzo! Ĉu vi havas ian senkulpigon pri tiu ĉi ago?“

„Ho jes; tio estis hazardo, via moŝto! Mi ne intencis rompi la ombrelon.“

Neniu virino estas tiel anĝelsimila, ke ŝi pli ŝatas glorkronon ol novan Pasko-ĉapelon.

(Londona opinio.)



Helsinki. — La rusa katedralo.

„Bone, bone“, ŝi rekrigis, „nun vi ja mem diras, ke la plafono estas supre. Ĉu oni frapis supre aŭ malsupre? Malsupre, mi pensas, do ili frapis kontraŭ la planko. Ĉu vi mem ne ĉiam diris, ke en Esperanto oni devas ĉion esprimi plejeble precize kaj plejeble logike?“

Mi ne plu scias, kion diri; mi do pli laŭte kriis: „Ne, plafono, plafono;“ kaj same laŭte ŝi kontraŭkriis: „Ne, planko, ne, planko.“ Tiel ni daŭrigis la vort batalon, daŭrigis pli kaj pli laŭte la reciprokan kontraŭkriegadon: plafono — planko; planko — plafono. Jen ŝia mano etendiĝis sub la liton. Mi komprenis — la pantofloj. Ha, kie trovi defendilon por mi? . . . Jen miaj ŝelkoj! Kaj ambaŭ ni eksaltis en niaj litoj kaj staris unu kontraŭ la alia kun longaj, blankaj noktiteloj, ŝi kun ŝiaj longaj, disigiĝintaj haroj, simila al amazono, mi ŝvitante kaj spiregante, senhara — ĉar harojn mi jam ne havas. Sekvis bato post bato tĉ — sssst, tĉ — sssst, dum kontraŭflugis la konformaj vortoj: planko — plafono, planko — plafono. Kun bruo terenfalas la fragmentoj de la lava vazo, kiun ŝi estis frakasinta pro sia „nervozeco“; sekve de mallerta bato mia la lampo tintante falis de la nokta ŝranketo. Ploreigante la infanoj forlasis sian kuŝejojn kaj savis sin sur la koridoron; oni frapegis kaj bumbadis supre, malsupre kaj apude. Fine konsumite ni ambaŭ refalis en la litojn, ne klariginte la gravan aferon. La sekvintan matenon kvar familioj plendis ĉe la domestro pri nia nokta malpaco. Ĉu mi mem havis noktan pacon kaj pacan nokton? De tiu tempo ĉiujfoje kun timo kaj maltrankvilo mi enlitiĝas kaj preĝas al mia Dio: Gardu min en ĉi tiu nokto kontraŭ ĉiuj danĝeroj kaj kontraŭ la Esperantemo de mia edzino!

Kara sinjoro! Lernigu al via edzino ĉion, kion ŝi volas, sed neniam nian karan lingvon Esperanto!

Via malfeliĉa

Kristiano Mallerta.

kaj en la Specimenfoiro en la centra urbo, kaj en la Foiro por Tekniko kaj Konstruado sur la ekspozicia teritorio — estis bonkvalita kaj pro tio tre dezirata. La foiraj specimenoj donis klaran bildon pri la tutgermana produktado kaj pri multaj gravaj eksterlandaj produktadoj. Precipe dum ĉi tiu foiro oni denove vidis, ke la loka kaj tempa kunigo de ĉiuj foiraj aferoj donas grandan avantaĝon.

### La XIV-a Foiro en Paris (10.—25. majo 1922).

La Pariza Foiro estas ĉiujara grava manifestado de la franca komerco. Ĝi havis 1750 ekspozantojn en 1917, 2400 en 1919, 3100 en 1920, 3750 en 1921 kaj 4300 en 1922. La kovrita surfaco estas nun 18 hektaroj sur la esplanado de Invalidoj kaj en „Champs de Mars“. Estas rimarkindaj la haloj de la elektra industrio, de juvelarto, Parizaj artikoloj, mebla industrio, maŝinoj, komerca organizo kaj laboroj de lernejoj de militinvalidoj. La klientaro el plej diversaj landoj estis tre multnombra.

La komitato de la Foiro afable donis senpage al la Pariza-grupo grandan budon 1003—1005 en la strato de eksporto kaj eldonis, kiel la pasintan jaron, cirkulerojn kaj kolorajn afiŝojn en Esperanto. La komitato korespondas en Esperanto. Skribu: Comité de la Foire de Paris, 8, Place de la Bourse, Paris 2.

Kelkaj ekspozantoj, kiel la komerca revuo „Les Echos“ kaj la fervojoj Paris-Orléans, en iliaj budoj elmetis anoncon „Korespondas per Esperanto“.

### Firmoj kaj Institucioj, kies Esp. eldonaĵoj estis disdonitaj en la budo „Esperanto“ dum la Pariza Foiro.

Gvidlibroj: Ŝtataj Fervojoj (Chemins de Fer de l'Etat); Fervoja kompanio Paris-Orléans; „Syndicats d'Initiative“ (Societoj por turismo) de Vals-Les-Bains, Vichy, Tours, Grenoble, Vaison (Vaucluse).

Komercaj Cirkuleroj: teniloj por tuloj M. Masseron, 10, rue de la Parallele, Montreux (Seine); telegrafaj kodoj Codes Lugagne, 7, rue Lafitte, Paris (ekzistas kodo en Esp.); transporta societo: C-o Mondiale de Transports, 25, rue d'Alsaca, Paris; Fabriko de trikajoj L. Wymchenk, 130, rue de Rivoli, Paris; Mebloj Gregoire, 57, Bd. Beaumarchais; Mebloj por skribmaŝinoj Cosmos, 3, rue Grammont, Paris; Vojaĝoficejo Bennett, 4, rue Scribe, Paris.

## La XI-a Germana Esp. Kongreso en Breslau.

La XI-a kongreso de G. E. A., kiu okazis Pentekoston en Breslau estis laŭ nombro de vizitantoj, laŭ aranĝo kaj laŭ rezulto de la diskutoj plena sukceso por G. E. A. Jam vendredon kaj sabaton estis aranĝataj ekzamenoj de la Germana Esperanto-Instituto, gviditaj de la direktoro de l' Instituto, D-ro Dietterle. Sabaton estis salutvespero kun diversaj deklamadoj, teatraĵoj kaj diversaj aliaj prezentoj. Jam kelkcento da gastoj el ĉiuj partoj de Germanujo kaj eksterlandaj ĉeestis. Dimanĉon matene je 8 h. estis solena diservo en la St. Vincenc-preĝejo. La meson legis preposto Becker, kaj D-ro Hotzelt predikis. La oficiala malfermo de la kongreso estis je 10 h. La prezidanto de GEA, D-ro Steche, faris la salutparoladon kaj resume raportis pri la progresoj en la antaŭa jaro. Klare oni sentis, ke li ankoraŭ staras sub forta impreso de la Genève-a konferenco, same kiel tio ankaŭ estis dum la tuta kongreso de D-ro Dietterle. Ambaŭ sinjoroj ĉe ĉiu okazo direktis la atenton de la samideanaro al sukcesoj de la konferenco, kiujn ni nun devas kompletigi kaj uzati. La kongreson salutis oficiale nome de la

### La Klalo.

Pastro dufoje rifuzis edzigi geamantojn, ĉar je ambaŭ okazis la edziĝonto estis ebria. La pastro diris al la edziĝinto: „Mi ne komprenas, kial vi venis al la preĝejo kun viro en tia stato.“ Ŝi respondis al li, ke, kiam li estis malebria, li perlaste malkonsentis veni.

### Geedza Konversacio.

Gasto en hotelo al viro ĉe la telefono: „Pardonu min, sed vi jam staras antaŭ la telefono 20 minutojn kaj ankoraŭ ne malfermis la buŝon.“ Telefonanto: „Ne miru, sinjoro, mi estas parolanta al mia edzino.“

### Esepto.

Edzino al edzo: „Ĉu ĉiuj viroj estas sensenculoj?“ — „Ne, kelkaj el ili ja estas fraŭloj.“

### Aforismo.

Ridu kaj la homaro ridos kun vi, ploru kaj vi ploros sola! — Ella Wheeler Wilcox.

## Japana spriteco.

Dum la tempo de l' dua franca imperio oni sendis baronon Gross al Japanio, por ke li intertraktu kun la japana registaro pro la malfermo de certaj japanaj havenoj por la komerco. Dum la traktadoj li nomis interalie ankaŭ unu havenon, ĉe kies mencio la japanaj altranguloj ridetis tiel malkaŝe, ke li demandis ilin pri la kaŭzo de ilia gajeco. Ne respondante rekte tiun demandon unu el la japanaj ministroj klarigis al li:

„Komprenable ni malfermos al vi la koncernen havenon, se rekompence ankaŭ vi malfermos al ni certan havenon.“

„Kiu ĝi estas?“ sin informis la franca ambasadoro.

urbo ties ĉefurbestro dirante, ke laŭ naturaj kondiĉoj la tempo laboras por Esperanto. Plue salutis preposto Becker nome de IKUE kaj — kio estis precipe grava — de Lia Kardinala Moŝto la episkopo de Breslau. Sekvis plue salutparoloj de multaj Esperantistaj organizadoj. Ankaŭ la japana 3-ano Narita kaj samideanoj el Ĉeĥoslovakio kaj Aŭstrio salutis la kongreson. Speciale ĝojigis saluttelegramo de la „Franca Societo por Esperanto“. En apudaj ĉambroj estis videbla bone aranĝita, ne tro granda ekspozicio. Post la tagmanĝo estis la 1-a laborakunsido de GEA, dum kiu oni aŭdis la raportojn kaj decidis pri la nova regularo, en kiu estas aliigitaj kelkaj paragrafoj ne plu taŭgaj por nunaj cirkonstancoj. Vespere oni ĝuis belan koncerton. Dua laborakunsido lundon matene pritraktis la diversajn aliajn punktojn de la tagordo, speciale la subtenon al la Instituto. Peton de s-o Sappl pri aprobo de la titolo „Profesoro“ por diplomitaj Esperanto-instruantoj oni rifuzis energie kaj eĉ avertis, ke tia „Prof. h. c.“ riskas havi konflikton kun la prokuroro. Posttagmeze la kongresanoj vizitis grupope la urbon kaj ties vidindaĵojn. En tri diversaj grupoj oni rigardis sub lerta kompetenta gvidado la universitatojn, la Vincenz-preĝejon kaj la katedralon, la urban domon kaj la malnovajn urbkvartalojn, poste kunsidante en la „Schweidnitz-Keller“, restoracio en la keloj sub la urba domo.

Bona imitinda ideo estis la „Silezia vespero“, dum kiu oni prezentis al la gastoj teatraĵojn, kantojn kaj deklamadojn en la dialekto de la kongresregiono kaj popolajn dancojn. Sekvanta balo daŭris ĝis la hela tago.

Tamen tio ne malhelpis, ke ĉiuj interesuloj jam frumatene kunvenis por la fakaj kunsidoj. Okazis multaj samtempe; tial nia raportanto ne povis partopreni ĉiujn. Ni nin devas limigi je mallongaj raportoj ne dubante, ke GEA donos la adresojn de la koncernenaj ligoj, kiuj donu detalajn informojn.

Okazis jenaj fakkunsidoj:

**Katolikoj.** Decido pri restarigo de germana fako de IKUE anstataŭ la nur pro eksteraj kaŭzoj forigita „Buked“. Diversaj proponoj pri pliperfektigo de „Espero Katolika“. — 36 partoprenantoj. Instruistoj. Post raportoj pri la progresoj de la antaŭa jaro kaj la sukceso de la konferenco en Genève decido pri aliĝo al Sciencia Asocio. Akceptindaj estas instruistoj de ĉiuj gradoj.

**Komercistoj.** Konsilo pri fondo de komercistaj grupoj, kiuj praktike uzu Esperanton por komercaj celoj laŭ la plano de la Dresdena grupo.

**Studentoj.** Propono pri internacia aliĝo al Sciencia Asocio. Definitiva decido estu farota en Helsinko.

**Sciencistoj.** (50 partoprenantoj.) Detala raporto pri la antaŭa jaro. Aliĝo de la ĝisnuna germana ligo de Esperantistaj akademiuloj je Germana Sciencia Esperanta Ligo por kunigi en ĝi ĉiujn membrojn de Sciencia Asocio el Germanujo kaj Aŭstrujo.

**Blinduloj.** Konstato, ke Germanujo laŭ nombro de Esperantistaj blinduloj marŝas en la unua vico. La germanaj Esp. blinduloj deziras aliĝi korporative al GEA por malaltigita kotizo kaj petas helpon de GEA, kiu promesas ĝin. Propono pri kotizo estas preparolata. Definitive estu decidota dum la blindula konferenco en Köln, julio 1922.

**UEA.** Raporto pri la movado. Scilgo de la delegito de Leipzig, ke la jarlibro de UEA aperos post du semajnoj. Propono, ke la oficejo de UEA eldonu propagandan folion kun aldonita aliĝilo por plifaciligi la laboron de la delegito. Atentigo, ke delegito ne bezonas respondi al demandoj kontraŭstarantaj al la regularo, aŭ senditaj sen respondokupon. Delegitoj faru al si precizajn statistikojn por plifaciligi la respondojn de la demandaro.

### „Liverpool.“

„Sed, ekscelenco,“ rediris la franco kun rideto, „Liverpool ja ne estas franca, sed angla haveno!“

„Certe“, respondis la japano, „sed, la haveno kiun vi nomis ankaŭ ne estas en Japanio, sed en Koreo.“

Kiuza.

## Danzig.

Pri la liberŝtato Danzig, la plej juna infano de la Ligo de Nacioj, mi devas ion skribi. Bone; volonte mi faras tion, ĉar Danzig estas mia naskiĝloko, kie la Esperanto-arbo kovriĝas je belaj burĝonoj.

Kiu konas Danzig? Estas ĉagrenanta fakto, ke la antikva Danzig, treege riĉa je artotrezoroj, nur nun estas konata en Eŭropo kaj aliaj mondpartoj per la lastaj traktadoj de la Ligo de Nacioj. Ho, mia Danzig, kiu jam pratempe fariĝis fama pro via floranta komerco!

La liberŝtato Danzig, fiksita per la paco de Versailles, ampleksas teritorion de resume 1900 kvadrat-kilometroj. Vere pigmea ŝtato, enhavante 320 000 loĝantojn. Kaj tamen — Danzig-a liberŝtato estas bela lando, Danzig bela urbo! Kiu konas ĝian situon? Kie ni trovas tian harmonian ludon de l' naturo kiel ĝuste ĉe Danzig? Ĉion reprezentas Danzig: de la alta monto ĝis la plata ebenaĵo, de la argilriĉa monteta ĉeno ĝis la graciaj sablobordo! Riveretoj, riveroj kaj la ondiga, ofte muganta Orienta (Balta) Maro rakontas al vi pri la naturbelaj, kiujn posedas Danzig.

Jen — kie la akvoj de la Mottlau kaj Vistulo miksiĝas, rapidante al la maro inter pentrinde kaj riĉe kulturitaj kamparoj, tie kuŝas de multaj centjaroj Danzig, serioza, masa, originala, majstroverko de homa mano, meze de belega dia ĝardeno. Fieraj pordegoj kaj multaj turoj altiras la rigardon jam el vasta malproksimo al la majesta urbo.

Mardon posttagmeze je 7 h. kongresanoj vizitis la „Jahrhunderthalle“ kun la plej granda orgeno de la mondo. Ankaŭ neamikoj de „himnado“ estis emociigataj, kiam la himno solene sonis tra la vasta halo. Vespere estis la solena malferma kunsido kaj poste la publika propaganda parolado de D-ro Steche, kiu okazis en la granda pleneja fest-salono de Vincenz-domo.

La venonta kongreso okazos Pentekoste 1923 en Plauen i. Vogtl.

La ĝenerala sukceso de la kongreso estis granda. La aranĝintoj ĉion bone funkciligis. Ĝoĝiga estas speciale la konstato, ke pli kaj pli distingiĝas la konvinko, ke niaj ligoj kaj institucioj laŭ kotizo devas akceli, ke ili staru „sur propraj piedoj“ kaj ne dependu de la mono de unuope bonfarantoj.

## Germanaj Esp.-Societoj en Ĉeĥoslovakio.

EINSIEDEL apud WÜRBENTHAL. Instruas en instruista rondeto s-o instruisto E. Link el Würbenthal.

FREUDENTHAL. Kurso por komencantoj estas gvidata de s-ino Just, instruistino el Jägerndorf. Partoprenas 40 personoj. Nova grupo estas fondata.

JÄGERNDORF. La kunvenoj de nun regule okazos merkrede vespere en Stadtkaffee.

M. OSTRU. Privoz. La distrikta unuigo por Nordmoravia kaj Silezio preparis karavanon al la germana Esp. kongreso en Breslau.

REICHENBERG. La grupanoj regule kunvenas marde vespere en la klubejo de Y. M. C. A. S-o prof. Scholze propagandis dum kunveno de profesoroj de industriaj lernejoj. La Esperanto-fako de la Foiro dissendas Esperantajn varbilojn kaj afiŝojn. Interesatoj bonvolu sendi mendleterojn al la Foira Oficejo, Wienerstr. 20.

RÖMERSTADT. S-o prof. Günther preparas starigon de nova grupo. Esperanto estas instruita en la privata lernejo por knabinoj de la lerta estrino de tiu ĉi lernejo.

TANNWALD-SCHÜMBURG. La grupo Gablonz invitis regionan kunvenon al T.-Sch., dum kiu s-o prof. Scholze parolis pri la organizo de distrikta unuigo. La kunveno decidis jam nun prepari la propagandon por la aŭtunaj kursoj.

TROPPAU. Kurso por komencantoj estas gvidata de s-o Horn el Jägerndorf. Partoprenas 26 personoj. La germ. Esp. unuigo reviviĝis.

ZWICKAU en B. S-o Rezek preparis propagandan vesperon, dum kiu paroladis s-o instruisto Beckert el Kunnersdorf. Kurso komenciĝis.

## Parolejo.

117. Ĉu nova radiko estas necesa?

Pri la propono komence de „La Idolo“ (n-o 85 de ET) mi volus diri, ke, se „aro“ aŭ „brutaro“ ne esprimas la ideon, ĉu „homaro“ (vidu en „Respondoj I, 25“), „personaro“, „komunumo“, „soci(et)o“, „asocio“ aŭ „rondo“ ne taŭgas? Tamen, ĉe neceso de nova radiko oni elektu pli internacie kompreneblan. Kvankam „greg“ estas angla kaj latina, la leksikonol ne montras ĝin sub tiu ĉi formo. (Ch.-G. St.-M., London.)

118. Ni laboru!

Ni devas celi propagandadi tiel Esperanton. Plej laŭdinda estas ĉia laboro pri enkonduko de Esperanto en lernejojn. Sur tia bazo ni povas ĝoje kaj fidoplene antaŭenrigardi, kaj ni ekvidos facile gloriĝajn tagojn por nia sankta afero.

Tempo estas oro, kaj ni ĝin devas profiti. Torento da fortoj perdis en niaj grupoj. Se ĉiu grupo starigus literaturan fakon kaj oni Esperantigus nacian verkon, post malrapida sed konstanta kaj kriika laboro, en kiu sumiĝus lerteco, atento kaj korekta silo, baldaŭ nia literaturo atingus grandegan riĉecon. (Ne celu ĉiam traduki gloriĝajn verkojn — laboro de gigantuloj — sed utilajn, bonajn kaj interesajn verkojn oni Esperantigu.)

Multaj Esperantistoj posedas mirindan konon de la lingvo, kaj tamen ili ne sentas sin kapablaj traduki libron. Tri Esperantistoj tial tradukis ĝin bonc, des pli bone, se estas pli granda la nombro de kunlaborantoj. Kaj ni bezonas riĉan literaturon en ĉiuj fakoj de homa progreso.

Ĉu ne vere?

(Fellkso Diez, profesoro ĉe Komercia Universitato, Bilbao, Hispanlando.)

## Gazetaro.

Nova Sociedade, Rio de Janeiro, majo. (Kun Esp. fakoj.) L'Unità Cattolica, Firenze (Italio), 1. 6. (Longa art. de Corrado Grazzini „Rassegna Esperantista“) The Quaker, amerika organo de la Kvakeroj, 14. 4. (Sepkolona art. pri Esp. de Raymond T. Bye.) L'Humanité, Paris, 2. 5. (Pri instruado de Esp.) Le Carnet de la Semaine, ĉs., Paris, 28. 5. (Letero de s-o Archdeacon pri la Esp. kongreso.) Le Moniteur de l'Oise, Beauvais, 31. 5. (Resumo de la manifesto al la instruistoj.)

L'Information Universitaire, ĉs., Paris, 28. 5. (Detala art. pri instruado de Esp.)

Unser Volk, Krefeld, 4. 6. (Ampleksa Esp. angulo.) Elbtal-Abendpost, Dresden (Diversaj art.) Danziger Volksblatt, 27. 5. (Esp. artikolaro.) Danziger Volksstimme, 15. 5. (Esp. en lernejoj.) Volkszeitung, Bromberg, 19. 5., 26. 5. kaj 2. 6. (Esp. artikoloj.) Közép Duna, Budapest, 31. 5. (Kun diversaj Esp. titoloj.)

## Recenzejo.

LIBROJ.

ESPERANTA LEGOLIBRO KAJ KRESTOMATIO. De T. Ĉif, 255 pĝ. 15 x 19 cm. Eldonejo de „Verda Utopio“, Osaka (Japanlando), 8266 Uehommachi7-chome, Minamiku, 1922. Prezo: Tole bindita 7 ŝvis. fr.

El la ekstreme oriento, el la lando de l'aŭno leviganta kaj de l' festo de la floroj Cerizujaj, kie nia movado kreskas dank' al senlaciaj nian ideon semantaj ploniroj, venis libro salutinda. — Estas nia konata samideano Ĉif Toŝio, kies libreto „Japanaj rakontoj“ eliris jam antaŭ multaj jaroj, kiu kompilis kaj parte mem verkis la krestomatilon. Amiko Ĉif estas lerta ĝardenisto, ĉar li sukcesas formi diverskoloran bukedon el valoraj literaturaj rozoj kolektitaj en la parko beletristika en Esperantujo. Pli ol cent legaĵoj kaj poeziaĵoj beharmonie kunstaras. Mi citas nur Zamenhof, Kabe, Deŝkin, Carl, Grabowski, Bicknell, Ŝidlovakaja, Skeel-Glöring, Krome ni konatiĝas kun nova japanaj stilstiloj: Vonago, Nakamura kaj Oŝaka. La libro estas destinita por japanoj; sub ĉiu paĝo troviĝas japanliteraj notoj kaj la dudekpaĝa antaŭparolo mem estas skribita japanlingve. — Mi malkaŝe konfeseas, ke mi lomete envia la orientajn verdstelulojn pro la bonega papero kaj la daŭranta tolbando, kiu ornamas la verkon plaĉantan al niaj okuloj. Iom post iom ĉe ni malbonvalutanoj la cirkonstanco „prilibras“ ankaŭ plibonigas, sed nur guiforme. — Estas ĝoĝiga fakto, ke la multnombro de l' japana samideano permesas la eldonon de bonaj Esperantaj en la propra lando; tiamaniere la japana merkato sendependiĝas de Eŭropo. Mi deziras al la Ĉif-a legolibro multajn sukcesojn. Vivant sequentes!

(G. Ajul.)

GAZETOJ.

Hungara Esperantisto. Majo. Vegetarano. Aprilo. La Espero. Majo. Adreso: Förlagsföreningen Esperanto Stockholm 1, Svedujo. Skandinava Esperantisto. Majo. Adreso: Karl Fröding, 1217 7-h Avenue, Rockford, Ill., Usono. (Unua poŝtmiila numero; la revuo aperis jam antaŭ la milito.) Esperanto Praktiko. Majo-junio. Germana Esperantisto. Junio. Holande Esperantisto. 1. Junio. France-Esperanto. Junio. (Atentinda artikolo „L'Esperanto et la Médecine“, de prof. d-ro J. Vanvert.) Belga Esperantisto. Majo. Kun „Esperanto-Film“, majo-junio.

AFIŜOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.

„ZAMENHOFS TABELLE“ sur poŝtkarto. Kunmetis kaj eldonis H. Hurler, Köln, Chlodwigplatz 26. Prezo mk. 1.50 kaj afr.

Kunmetante laŭvole la 2 duonojn de la karto oni legas ĉiujn vortojn de la tabelo kaj sub ili la sencojn en germana lingvo. Instruilo kiu helpas ne nur lerni, sed ankaŭ bone kompreni la vortojn. (Instruisto.)

EDUKISTARA INTERNACIO. Flugfolio en Esperanto. Havebla de s-o Marcel Boubou, 96, rue St. Marceau, Orléans (Loiret), Franc.

KONTRAŬ INSTRUADO PRI MALAMO. Oficiala raporto de la franca sekcio de Edukista Internacio. — 4-paĝa. Havebla de s-o Marcel Boubou, 96, rue St. Marceau, Orléans, Franc.

eliris la mondon. Apud Danzig li konvertis amase la idolanojn al la kristanismo, kaj poste li suferis la morton en Samlando (Orienta Prusujo). Nur dum la tempo de l' Germana Kavallira Ordeno (1308-1454) Danzig fariĝis malproksime konata.

Multe instigus skribi pri Danzig; sed la arimonumentoj de l' antikva tempo devas tie ĉi mem paroli. Per la skizado de landmonumentoj kaj straitbildoj oni ricevas la plej belan impreson pri tiu ĉi antikva, vere belarta urbo.

Tri epokoj krets la urbobildon: la epoko de l' 15-a jarcento, la „Renesanc“-epoko de la 16-a ĝis la mezo de l' 17-a jarcento, kaj la „Barok“-kaj „Rokoko“-tempo.

Kaŭze de du apartaj motivoj, sekvontaj numeroj de ET alportos kelkajn artikolojn pri Danzig. Unue: konigi al la fremduloj la artotrezorojn kaj naturbelajojn de la iam tiel riĉa urbo; due: atentigi la Esperantistojn pri Danzig, kie dum la nuna jaro okazos Antaŭkongreso por la XIV-a Mondkongreso.

B. A.


## Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis ankoraŭ: 224. Ges-oj Ferez en Strasburgo kolektis okaze de sia edziĝofesto 250 gmk. — 225. v. Doorn, Amsterdam 9 gmk. — 226. F-ino Edith Hak, Ruppertsdorf 5 kĉ.

## Nekrologo.

En Tarrasa, Hispanujo, mortis s-ino Irmina Invers,

la kara edzino de nia fervora samideano s-o Valenti Alavedra, prezidanto de la Komitato por la Gastigo de Aŭstraj infanoj. Tre juna, ŝi estis frapata de kruela malsano.



Danzig kaj ĉirkaŭaĵoj.

Interne la malnovaj stratoj estas mallarĝaj kaj ofte kurbigitaj, konvenaj al antikva fortikaĵo. La frontonoj de la domoj ofte estas riĉe ornamitaj kaj provizitaj je antaŭkonstruaĵoj kiel ankaŭ balustradoj.

Densa mallumo kovras la fondiĝon de la urbo Danzig. En la jaro 997 (ankaŭ fiŝistovilago) Danzig ricevis sian nomon, kiam la scilgo pri la morto de l' martiro episkopo Adalberto de Prago



# LEIPZIG-A FOIRO

La ĝenerala internacia foiro de Germanujo

La unua kaj plej granda foiro de la mondo. Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun foiroj por Tekniko kaj Konstrufako


Aŭtuna foiro 1922 de la 27a de aŭgusto ĝis 2a de septembro.

Printempa foiro 1923 de la 4a ĝis 10a de marto.



Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la foiroficejo por la specimenfoiroj en Leipzig:

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN IN LEIPZIG



## Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto - Handelsbureau) Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn lerojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝargas per la disendo de cirkuleroj.

Prizorgas la anoncadon en Nederlando. Intertraktigas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.

Sciligas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

## 100 diversaj poŝtmarkoj de Danzig, Saar, Supra Silezio, Memel en travidebla kovrilo

	1 paketo 100	10 paketoj 900
„München Gewerbeschau“ 1 serio 10 serioj 100 serioj	1.25, 2, 3, 4, 10, 20 mk.	60 550 5000
„Deutsches Reich“ novaj 5, 10, 20 mk.	50	460 4400
Ciferoj 5, 10, 15, 25, 30, 40, 50 pf.	40	350

Ĉio sur blanka papero, akurate stampita. — La prezoj en germanaj markoj. — Antaŭpago per banknotoj ĉiulandaj.

Postulu la novan juni-prezaron pri kompletaj serioj de Memel, Saar, Allenstein, Danzig, Supra Silezio, Marienwerder, Schleswig (Slesvigo), Bayern (Bavario), Württemberg.

Kontraŭ mondepono mi sendos kolektojn por elektado. Granda elekto en germanaj poŝtmarkoj, novaj koloroj, „lètes-bêches“.

Korespondado en lingvoj germana, angla, franca, Esperanta.

S-ino Emmy Schultze, Rogzow bei Köslin, Germ.

## Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 fl., 1 nord. kr., 1 šil., 1 av. fl., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fl., 5 litr., 7 fmk., 8 kč., 30 p. mk., 75 hung. kr., 550 pmk., 500 aŭstr. kr., internacie 5 r. amp. resp. kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdeziro de la abonkonto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas aŭveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

NASKIĜO. Al kapitano Pedro M. de Villa kaj lia edzino Evangelina Ugarte en Kuba feliĉe naskiĝis filino.

NEDERLANDAJ ESPERANTISTOJ! Sendu al mi sur poŝtkarto vian ĝustan nomon kaj adreson por la preparado de „Nederlanda Esperantista Adreslibro“! — J. B. E. de Koster, 28, l., M. H. Trompsstraat, Amsterdam.

MALALTIĜO DE PREZO. Esperantaj INSIGNOJ po 0.20 fl.; 25 insignoj po 0.15 fl. — Uzu la okazon! — Esperanta Domo, 28, l., M. H. Trompsstraat, Amsterdam, Hollando.

GASTIGO DUM FERIOJ. Kluj ĝesperantistoj senkoste gastigos vian ĉiujn semajnojn da ferioj unu germanan junan Esperantiston? Sciligojn petas Esperanto Grupo Perleberg, Germanujo.

P. MEDEM, Kaunas, Litovujo, forveturante pro malsano eksterlanden, esperas reveni fine de julio kaj petas krastan korespondadon ĝis aŭgusto.

Nederlanda Anonima Societo  
**Luksa-pano Fabrikoj**  
antaŭe Henri J. Carels.  
50 Butikoj:  
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.  
**Lunĉejo Carels**  
(ĉefo: H.A. Scharwächter)  
63 Weimarstraat, Den Haag.  
Oni parolas Esperanton.

**Itala Vino**  
Unuakvalitajn vinojn de la Piedmonto kaj Toskanio eksportas al ĉiuj landoj  
La Fermo **GIOVARA** Fedele  
Via Ciamarella 5, Torino (Italio).  
Plej granda seriozeco.  
Oni korespondas prefere Esperante.

**Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart (Germ.)**  
Wallruthbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13  
Telefona: N-aj 11458 kaj 11459 — Telegr.-Adreso: Bankvogt

---

Aĉeto kaj vendo de valorpapiroj.  
Proc. antaŭ de kontantaj deponoj.  
Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.  
Perado de ĉiusecaj negocoj.

**Kapital-Partoprenanto**  
por pligrandigo de profitportanta senkonkurenca entrepreno  
**gis Mk. 200 000.—**  
serĉata. Bonaj referencoj. Proponu al  
**Esperanto Komercista Grupo Dresden-N.**  
.....  
Nia nova Esperanta oferto aperis. Postulu ĝin tuj! Ni perdas ĉiujn negocojn. Filioj en Saaz kaj Barcelona.

**Internacia salutvespero 1922 Hamburg**  
okaze de la travojaĝo de la Helsinki-Kongresanoj la 2. aŭgusto (Etapo al la Internacia antaŭkongreso en Lübeck).  
Vespere je la 7 1/2

Dumtaga renkontejo de post la 10-a h. antaŭtagm.: Restoracio „Alsterlust“ ĉe Lombardsbrücke. (Laŭdeziro tie ankaŭ okazos komuna manĝado.)  
Ĉe la renkontejo oni ekmarŝos diverstempe kaj grupope por rigardi la vidindaĵojn de la urbo, ekz. Elbtunelo, haveno (rondveturo), Alster (rondveturo), muzeoj, centro de la urbo.

Vespere je la 7 1/2  
**Germana Biervespero**  
kun oficiala bonsaluto al la eksterlandaj gastoj.  
Antaŭnokte je la 11<sup>o</sup> daŭrigo de la vojaĝo al Lübeck.  
NB. Eksterlandanoj ĝustatempe anoncu sian alvenon al s-o A. B. C. Senff, Hamburg, Alsterdamm 17, IV.

Libra kaj Arta Presejo  
**Emil Friedr. Adolph**  
Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 58  
Fabrikado de bonkvalitaj artpresaj prospektoj kaj de ĉiuj presaĵoj por komercoj kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta  
Oni petu oferton.  
Korespondado: Esperante, Angle, France, Germane ktp.

**La Interŝanĝo**  
Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojoj jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, en kalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.  
Iara abonprezo: 10 francaj frankoj.  
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.  
A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

**Abonejoj de ET**  
en la landoj  
Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeiffer), Wien II/1, Postamt 24  
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beersiraat, Antwerpen. Poŝt-ĉeka n-o 28420.  
Bulgara: Georgi Ĵr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia  
Ĉeĥoslovaka: Otto Skleněka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.  
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.  
Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinko.  
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.  
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.  
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.  
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.  
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.  
Litova: Paŭlo v. Medem, Smelū g-ve 12, Kaunas (Kovno)  
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordecklego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.  
Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.  
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1 U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

S-o Ad. van Wesemael, studento, Heernislaan, Gent, Belgio, deziras korespondi per leroj kaj poŝtkartoj ilustr. (bfl.) nur kun ekster-eŭropanoj.

Fraŭlo Georgi Ĵr. Kovačev, str. Ĥaĝi Dimitr 21, Sofia, Bulg., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj kun ĉiulandanoj.

Fraŭlo Nikola Ivanov, str. Regentska 79, Sofia, Bulg., lernanto en mekanika-teknika lernejo, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj, precipe kun lernantoj de mekanikaj-teknikaj lernejoj pri diversaj temoj; interŝanĝas poŝtmarkojn kontraŭ katalogoj kaj libroj en germana aŭ franca lingvo.

Lichtenstadi Mihály en Vecsés, Pestmegye, Hungario, deziras korespondi kun ĉiulandaj ĝesamideanoj, por interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. aŭ taggazetojn nacilingve presitajn.

Alfred Sover, S. Pärnu 45, Nomme, Estonio, deziras interŝanĝi belegajn poŝtkartojn ilustr. de pejzaĝoj kaj popolkostumoj (bfl.).

Mi vendas pm Litovio de Zeligowski 1000 pecoj 125 gm. aŭ 8 fr. tonte pm. eldonita sur tiu tereno 160 germ. aŭ 11 fr. f. Polio 1000 pecoj aŭ 100 bonoj 100 germ. mar. aŭ 6 fr. 1/3 monoj antauen. K. Lichtensztejn, Bialystok, Sobieska 1, Polujo.  
(Neniĉe povante kompreni la enhavon de tiu ĉi anonceto, ni represas ĝin fidele laŭ la manuskripto; eble niaj legantoj komprenos. — Red.)

Poŝtmarkojn de Danzig (la plej novajn) vendas kun 40% pialtigo s-o Wilhelm Machalinski, Danzig, Domlnkswall 2; ĉe granda mendado nur 30% pialtigo.

S-oj Alfons Herrmann, Cleve, Germ., Triftstr. 1, kaj Stefano Müllejans, Cleve, Spycakir., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

**Arkitekto de Konstruaĵoj**  
Max Gentz  
serĉas komisiilojn pri kalkulado de projektoj kaj pri direktado de konstruado de fabrikoj, loĝdomoj laboristaj aŭ ekonomiaj konstruaĵoj.  
Dresden (Germanl.), Peterstr. 50, II.

**Cigar- kaj Tabakfabrikejo**  
Mühldorf a. Inn, Bavarujo, Germ.  
ofertas ĉiujn tabakfabrikaĵojn, cigarojn, cigaredojn, fumtabakojn ktp.  
Precipe ni ofertas cigarojn „Espero“ kaj serĉas reprezentantojn.  
Bonvolu postuli ofertojn pri tabakfabrikaĵoj. Reprezentantoj por en- kaj eksterlando serĉataj.  
Alteshime  
Cigar- kaj Tabakfabrikejo Mühldorf.

**Gablonz'aj Artikloj**  
Bijuterioj, lumigiloj, perloj.  
Produktkapabla firma serĉas interrilatojn kun nur pogranda-ĉetantoj. Prenas sur sin ankaŭ la aĉet-reprezentadon en ĉiuj landoj.  
Altablajn aŭskribojn bonvolu sendi al la firma  
**Kleinwächter & Schwarz,**  
Gablonz a. N. (Ĉeĥoslovakio).

**Art-Amikoj,**  
Artajo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,  
kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, olepentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstraj, turnu sin a  
**Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gieisdorfergasse 5.**  
Malaltaj prezoj.

**Korespondo kaj Interŝanĝo.**  
Korespondadon kun U. D. C. anoj en la tuta mondo deziras Heinrich Michalek, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉsl.; interŝanĝas ankaŭ gazetojn kaj broŝurojn.  
S-o Capdevilla en B. — Ni ricevas vian pagon. Ne sciante vian adreson, ni petas vin ĉi-manlere, sendi al ni la tekston por via anonceto.  
Pelucchi G., Via Settembrini 5, Milano 29, Italio, interŝanĝas kun ĉiulandanoj Esp. kaj nacilingvajn librojn kaj gazetojn; poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr. — Korespondas ankaŭ.  
Du amikoj: Theodor Weder, Blumenstr. 747, kaj Hermann Scherbaum, Teichstr. 558, Gross-Schönau, Sakajuo, Germ., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj lerojn. Ili ankaŭ volonte skribos pri naciaj kutimoj, literaturo, naturo kaj politiko kun ĉiulandanoj.  
Rusio. Asirakan, Pristanskaja ul. 6, P. V. Savin. — Mi deziras korespondi kun ĉiulandanoj kaj petas sendi komerc-informojn pri ĉiuj komercaĵoj por komerc-informejo.  
K-do Bazilo Averin, Rusujo, Astrachani, 6 uĉ, 3 Barakaida, n-o 30, deziras korespondi pri ĉiuj demandoj per leroj, ilustr. poŝtkartoj, kaj interŝanĝas poŝtmarkojn, Esp. gazetojn, literaturon. Interesiĝas pri astronomio.  
Otto Schmidt, Freiheit, Trautenau, Ĉeĥoslovakio, sendas por 50—200 nedifektitaj poŝtmarkoj (ankaŭ duoblaĵ) la saman kvanton da ĉeĥoslovakaj aŭ aŭstraj.  
Du amikoj deziras korespondi kun la tuta mondo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn. — Josef Ducka kaj Josef Huizdii, ambaŭ en Schatzlar, Ĉeĥoslovakio.  
S-o J. B. E. de Koster, M. H. Trompsstraat 28, l., Amsterdam, Hollando, deziras ŝanĝi ĉiusecajn fotografiaĵojn.

Sendu 50—100 poŝtmarkojn vialandajn kaj vi ricevos tuj samkvanton da novaj kaj malnovaj germanaj, bavariaj kaj württembergaj, de Ferdinand Hahn, Bremen, Riensbergerstr. 22, Germ.  
Fraŭlo Richard Fischer, Schillerstr. 5, Wittenberge-Elbe, Germanujo, inste elpetas korespondadon kun socialistaj gelaboristoj eksterlandaj.  
S-o Ed. Dance, Jaunlatgale, Larvio, deziras korespondi per leroj kaj poŝtkartoj ilustr. kun ĉiuj landoj.  
Mi deziras korespondi kun fraŭlinoj. — E. Lichtensztejn, Bialystok, Pol., Sobieska 1.  
Filatelistoj, kiuj sendos al mi 50 aŭ 100 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos la saman kvanton de mia lando kaj aliajn de Suda Ameriko. — Eŭropo, Azio dum la milito. — F. R. Varela, San Francisco 824, Buenos Aires, Argentina Respubliko.  
Mi deziras korespondantojn Esperantistajn de ĉiuj patrujoj, sen temoj de specialaj konversacioj. — F-ino Henriette Palandre, 1, Montée du Mont Sauvage, „Croix Rouge“, Lyon, Francujo.  
S-o Lázaro Abramović, Bahmut, Ukrainio, Ruslando, Ĥarkovskaja 65, deziras korespondi per leroj, poŝtkartoj kaj poŝtkartojn ilustritaj (bfl.) kun ĉiuj landoj.  
S-o Ignacy Goslawski, Targowa 24, Lodz, Pollando, deziras korespondi per leroj kaj ilustritaj poŝtkartoj. Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergerstrasse 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj, precipe ekstereŭropaj. Ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn.  
Poŝtmark-kolektantoj atentu! Mi serĉas filatelistaĵojn interrilatojn kun la tuta mondo. Mi ŝanĝis kaj vendas. Mi posedas grandan aron da belaj aŭstraj poŝtmarkoj. Kontraŭ referencoj mi forsendas belajn elektaĵojn de aŭstraj poŝtmarkoj, por aĉeto aŭ vendado. — Josef Kolhofer, Wien 15/4, Zehetnergasse 37.